

E Ŭ R O P A B U L T E N O

Sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo

n-ro 13

9-an de majo 2001

Redaktas:

Umberto Broccatelli -

Prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio

Via G. Brodolini 10 I-00139 Roma - Italio

u.broccatelli@fiscalinet.it

-u.broccatelli@libero.it

tel./fakso +39-0687135019

Kasisto de EEU:

Hans ten Hagen, ten.hagen.esperanto@wxs.nl

UEA-konto de EEU: **eece-p**

Tiu ĉi retbulteno konsistas el du partoj: unu estas informilo pri *Eŭropa Esperanto-Unio (EEU-informilo)* kaj pri la eŭropa agado de la Esperanto-movado ĝenerale; la dua estas libera forumo pri temoj ligitaj al la procezo de eŭropa unuiĝo kaj al ties rilato kun la celoj de la Esperanto-movado (**Eŭropa debato**).

Kiu deziras ricevi ĝin, tiu sin anoncu al la ret-adreso *u.broccatelli@fiscalinet.it*; same se oni ne plu deziras ricevi ĝin. Al la sama adreso oni sendu kontribuojn kaj reagojn. Dankon pro via atento



Esperi pri daŭrado de harmonio inter multaj ŝtatoj sendependaj kaj malligitaj, tio estus neglekti la unuforman iradon de la homaj okazaĵoj kaj kontraŭiri la sperton akumulitan de la tempo”
Hamilton, The Federalist

Oni povas ricevi la Bultenon en papera formo fariĝante “simpatianto de EEU”, per sendo de kontribuo de almenaŭ 20 € jare al la UEA-konto **eece-p**

TTT-ejo de EEU: <http://lingvo.org/eo.html>

E E U - I N F O R M I L O

2001 - EŬROPA JARO DE LA LINGVOJ

La plej grava Esperanta evento - krom la eldonaj iniciatoj - de la Eŭropa Jaro de la Lingvoj estas ĝis nun la partopreno de esperantista grupo da junuloj en la tago de *Euroscola* ĉe la Eŭropa Parlamento en Strasburgo.

Pri tio ni donas la detalan raporton de la franca EEU-komitato s-ro Claude Longue-Epée. Ĉar ĝi estis sufiĉe longa, ĝi okupas la tutan nunan Bultenon, kiu ankaŭ rezignas je la parto “Eŭropa debato”. Ni kore dankas la verkinton de la raporto.

* * *

Raporto de Claude LONGUE-EPÉE pri la Euroscola-Tago en Esperanto de la 8-a de majo en Strasburgo

**MALFERMITA LETERO AL MIA AMIKO, KIU INSTRUAS EN GIMNAZIO, KIE LI STARIGIS
ESPERANTO-KURSON, KAJ KIU ANKORAŬ NE SCIAS KIEL ALLOGI SIAJN LERNANTOJN
AL PERSISTA LERNADO KAJ KIEL KONVINKI TIES GEPATROJN.**

Hodiaŭ estas la 10-a de majo. Antaŭ du tagoj la “Euroscola-Tago” okazis en la Strasburga parlamentejo kun tuteŭropaj junuloj, bazite sur la temo de la kampanjo “2001-jaro-de-la-lingvoj”. De du tagoj, mi povas aserti, ke “Euroscola en Esperanto” ekzistas: tion mi ja scias... ĝin mi renkontis! El pridubinda revo, ĝi fariĝis realaĵo konkreta kaj kontentiga.

Reveninte antaŭ-hieraŭ vespere el Strasburgo, kie mi vizitis la parlamentejon, kaj precipe la tieajn *Euroscola*-okazintaĵojn, mi ja estis kontenta, sed ankaŭ tre laca. Tamen mi kapablis legi kaj apreci la hodiaŭan retmesaĝon de Gilbert Stambach, kiu raportas pri la tieaj eventoj de la 8-a de majo. Mi alte taksas kaj tute aprobas tiun raporton, kiu certe necesis - kaj sufiĉas - por taŭge resumi la disvolviĝon de la manifestacio kaj la impresojn de ĝi vekitajn.

Tamen mi volas aldiri, ke mi speciale pagis mian vojaĝon al Strasburgo, ke mi ŝvitis en la salonoj kaj en la

koridoroj de la parlamentejo, ke mi incitite duonmalsaniĝis pro iuj aŭditaĵoj kaj iuj parlamentaj misorganizitaĵoj, ke mi ĝojis diskuti kun multaj esperantistoj, ke mi konsideris min komisiita observanto de “Espéranto-France”, kaj ke ĉio tio miaopinie ankaŭ min rajtigas diri kelkajn vortojn pri la “Afero Euroscola” kaj aparte pri la “Afero Euroscola en Esperanto”.....

A-TIO KIO ESTAS LAŬVOLE, ĈU SIMPLA RESUMO, ĈU NEPRE KONSIDERINDA KONKLUDO.

Ĉar mi estas tre malordema - kaj ankaŭ por ne riski forgesi kelkajn punktojn, kiuj ŝajnas al mi direndaj -, mi komencos mian raporton per la konkludoj. Kaj tiuj konkludoj miaopinie estas la jenaj.

PRILA ĴUSA SUKCESODE «EUROSCOLA EN ESPERANTO».

Tiu “Euroscola-Tago”, por Esperanto kaj por la esperantistaro, estis sukceso. Komprenble mi ne certas, ke la unutagaj kvazaŭaj debatoj de kelkaj elitaj junuloj profunde influos la pripensojn, la laborojn kaj la decidojn de la Eŭropa parlamento aŭ de la Eŭropa komisiono (kiuj cetere forestis el la lokoj). Sed ni ne forgesu, ke, dum tiu tago, “La pordoj estis malfermitaj” kaj ke fakte svarmis multaj vizitantoj. Tiel estis rimarkita Esperanto. En la koridoroj, en la laborsalonoj, en la debatamfiteatro, estis klare aŭdita Esperanto. Same estis priparolita kaj komentariita Esperanto. Kaj ne nur inter la muroj de la parlamentejo, sed ankaŭ ekstere, danke al intervjuoj, danke al ĵurnalaj artikoloj, danke al televidaj elsendoj. Kaj ne nur fare de la esperantistoj, sed ankaŭ danke al aludoj de iuj partoprenantoj.

La tre bone organizita budo celanta al elmontrado de Esperanto, kaj la konvinkemaj deĵorantoj, certe tiom kiom la junulara Euroscola-manifestacio, efikis al tiu sukceso.

La baza fundamento de tiu dufonta sukceso estas nia samideano Gilbert Stambach, kiu persiste kaj daŭre neflankiĝante batalis kontraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, stumbligiloj kaj insidiloj. De Gilbert la obstineco venkis ĉiujn obstaklojn, malhelpojn kaj bremsadojn, kiuj estis starigitaj, unuflanke de la parlamentaj oficistoj, interpretistoj kaj aliaj instancoj, sed ankaŭ aliflanke de la samideanaj dubemo (kian mi mem elmontris je la komenco de la afero), malkomprenemo, timemo kaj mallaboremo.

Mi ne dubas, ke la junaj partoprenantoj tre feliĉas kaj fieras pri tiu “Granda Tago”, de kiu ili kunportis amason da memorajoj. Mi ne dubas, ke ili estos fervore reklamantaj pri la afero kaj la intereso lerni Esperanton al siaj amikoj kaj samlernejanoj.

PRILA NEPRA TUJA AGADO, POR EFIKA PLUVIVO DE “EUROSCOLA EN ESPERANTO”.

Konsiderante la jaman traboran efikon de tiu unua guto, ni havas la nepran devon daŭrigi niajn kampanjojn al “Euroscola en Esperanto”. Unue pro la reklama efiko de la manifestacio mem, due pro la spuroj lasitaj en la junaj mensoj de la partoprenantoj. Laŭ mia opinio, kiun mi intencas prezenti en la franca nacia kongreso en Limoges, tio signifas diversajn agadojn, kiujn mi provas analizi ĉi-sube.

Ekde nun, antaŭ la lernejaraj ferioj, ni devas prepari nian aferon por la venontjara “Euroscola Tago”.

Ekde nun, Gilbert denove (sed kiu povus esti pli sperta, pli fidinda kaj pli efika?) devas klopodi al la parlamentaj instancoj, oficistoj, deĵorantoj, k.t.p... Se eble, ekde nun li devas starigi la problemon de la esperanto-interpretado... Sed tio postulas ankaŭ, ke ĉiuj interesatoj pri tiu afero alportu ekde nun sian helpon al Gilbert, konformiĝante al ties indikoj, proponoj, demandoj, kaj irante la saman vojon al la sama celo. Tio postulas ankaŭ, ke niaj responsuloj oficiale rilatantaj kun Eŭroparlamentanoj “enigu la najlon” kaj “ellavu la cerbojn” de siaj alparolitoj. Mi mem renkontos Gérard Caudron la 28-an de majo, kaj jam entagordigis la problemon de “Euroscola”. Same devus fari ĉiuj landaj responsuloj de la “Pirlot-listo” al siaj propraj konataj Eŭroparlamentanoj.

Ekde nun, ĉiuj Eŭropaj landaj Esperanto-asocioj, kunlabore kun ILEI kaj ties lokaj sekcioj, devas konsideri, ke “Euroscola en Esperanto” estas sia propra afero. Ili devas celi al preparo de pluraj grupoj de gimnaziaj lernantoj kaj al elektado de unu “Euroscola teamo”. El la “membro-ŝtatoj” ĉi-jare estis naskitaj tri grupoj (Franca, Itala, Sveda). Venontjare devos kreiĝi tute logike dekkvin grupoj!... El la “kandidataj ŝtatoj” ĉi-jare venis kvar grupoj (Hungara, Kroata, Litova, Rumana), kiuj cetere alportis alte estimindan kontribuon. Sed estas aliaj “kandidataj ŝtatoj”, kiuj same devus montri sin en la esperantista trupo de la venontaj jaroj.

Ekde nun, la kolegiaj kaj liceaj instruistoj, kiuj intencas kandidatiĝi al “Euroscola en Esperanto” devas zorgi pri diversaj punktoj. Ili devas zorgi, ke ilia teamo (eĉ se pro tio ĝi estas pli malampleksa) posedu sufiĉe bonan regon de la lingvo. Tro ofte, laŭ miaj oreloj, estis aŭdata krokodilado. Por tion korekti, certe necesas: jam antaŭa lernado de la lingvo, kaj bone organizataj seninterrompaj kursoj dum la lernojaro.

Ekde nun, ili devas zorgi pri: renkonto kaj konvinko de sia lernejestro; organizado kun tiu-ĉi de “Klasprojekto” kun instruo pri historio kaj institucioj de Eŭropa Unio; aranĝo de dumferia staĝo de praktikado... Mi povas aserti, ke ĉio tio estas ebla, kaj fakte estis realigita en Kolegio Molière (por la franca teamo), danke al organizo starigita ekde junio 2000.

Ekde nun, ĉiuj tiaj interesatoj devas enlistigi sin en la reta "Listo Euroscola en Esperanto". Kaj ĉi-tiu, majstre lanĉita kaj prizorgita de Philippe Berizzi, devas ekde nun plufunkcii sur la nunaj bazoj kaj sur la samaj lanĉiloj kiel pasintjare.

B-MERITITAJ DANKOJ KAJ GRATULOJ.

Tiel parolinte pri la esperebla estonteco kaj pri ĝia tuja preparo, mi tamen ankaŭ volas iom raporti pri kelkaj aliaj pripensoj naskitaj de tiu-ĉi "Euroscola-Tago".

Kaj, por komenci, la entute bona disvolviĝo de nia esperantista partopreno - malgraŭ kaj kontraŭ la antaŭaj malfacilaĵoj, malgraŭ kaj kontraŭ la malpermeso de oficiala esperanta tradukbudo, malgraŭ kaj kontraŭ kelkaj misfunkcioj de la gvidado de nia trupo fare de la parlamentejaj pedeloj... - instigas min unue adresi Dankojn kaj Gratulojn al tiuj, kiuj baraktis ofte de pli ol unu jaro por sukcesigi tiun esperantistan partoprenon.

Al Gilbert Stambach, kiu havis la fidon kaj kuraĝon iniciati la projekton "Euroscola en Esperanto", kaj pro ĉiuj kialoj ĉi-supre menciitaj.

Al tiuj, kiuj kredis al tiu projekto, kiuj tuj sentis la grandan draston de ĝia efektiviĝo, kontraŭ la timoj, la manko de rimedoj, la devojiĝoj de misdiskutemuloj. Al Claude Nourmont kaj al Philippe Berizzi.

Al Philippe Berizzi ankaŭ pro lia oportuna kreado kaj regado de la retlisto, kaj pro ties, dank-al-li-a, efikeco.

Al la sep skipoj de kursgvidantoj kaj akompanantoj, kiuj bonege gvidis siajn ŝafarojn, kiuj negrumblante konformiĝis en la regulojn, kaj kiuj elegante elturniĝis el malfacilaĵoj. Kaj aparte al niaj amikoj el orienteŭropaj landoj, kiuj - por la uzo kaj la pripenso de la Eŭropoficialuloj, de la Eŭropparlamentanoj kaj de ĉiaj politikistoj - elmontris samtempe la grandan gravecon kaj la taŭgan solvon de la baldaŭ pliampleksiĝonta problemo de la lingvoj en pliampleksiĝonta Eŭropa Unio.

Al la skipo de junuloj, kiuj portis sur siaj ŝultroj la pezon de la tuttaga agado. Al Gabrielo Corsetti, kiu prezidis la esperantan laborgrupon por adapti nian rezolucion kaj prezenti ĝin al la unutagaj junaj parlamentanoj. Al Adela Micota, kiu legis tiun rezolucion en tiel pura, belsona kaj flua esperanto, ke oni ne povis ne esti ĉarmata de ŝi... Al Xavier Dewidehem, kiu prezentis, en lerta kaj senriproĉa lingvo, la esencon de niaj laboroj, kaj kiu plenumis la malfacilan taskon traduki en la oficialan francan lingvon siajn proprajn frazojn kaj tiujn de siaj kunuloj Adela kaj Gabrielo.

Ankaŭ Xavier, kune kun la hungara samideano Arpad Pasztor, kuraĝe kaj elokvente alfrontis la FR3-intervjuistojn. Eble tro elokvente kaj entuziasme (laŭ tio, kion mi sciis sed ne havis okazon vidi), ĉar la televida prezento ŝajne donis la impreson, ke estis internacia esperanta grupo kiu akceptis kaj gastigis parlamentan oficistaron kaj vizitanton en la Strasburga parlamentejo!....

C-KELKAJ IMPRESOJ LAŬHAZARDE NOTITAJ.

Ja min impresis kelkaj punktoj, kiujn mi plukis, laŭirante laŭhazardan inspiron.

ESPERANTA MEDIO KAJ ESPERANTA ETOSO.

Dum la tuta tago, ĉeestante, promenante, babilante kaj diskutante kun samideanoj, mi sentis tiun impreson - kutime sentitan dum internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj - de varma etoso de interkompreno kaj samfamilieco. Des pli forta estis tiu impresoj, ju pli juna estis la samideana rondo. Sed mi dubas, ĉu la neesperantistaj eksteruloj konsciis pri tiu interesperantista intemeco. Ofte niaj (tro) multaj krokodilaĵoj perdiĝis en la babelo krokodilado, kiu estas la ĉi-tiea esprimmodo...

PRILA PARLAMENTEJA ORGANIZADO.

Entute, malgraŭ eksterordinara svarmaĉa dismoviĝo, malgraŭ impresoj de bordeleca misorganizo, malgraŭ longaj atendoj en koridoroj kaj malgraŭ kelkaj perdiĝoj en tiuj koridoroj, ni devas konsideri, ke la parlamenteja oficistaro sufiĉe bone prizorgis nian ducenton da esperantistoj. Certe danke al la klopodoj de Gilbert Stambach...

La grupo ja profitis specifan eniron por faciligi sian akcepton, specifan insignon por rimarkigi sin, specifan matenmanĝon, specifan manĝejon, specifan salonon vastan kaj taŭgan por siaj specifaj diskutoj. La grupo havis specifan oficestron, por klarigi al ni, ke ĉiu devas manĝi bulkon ne pli ol po unu, ke la aŭdiloj kaj mikrofonoj ne estas ludiloj, ke ĉiu devas resti grupe kaj ne devojiĝante por ne perdiĝi. Kaj la grupo havis specifan pedelon, por gvidi laŭ la taŭgaj vojoj al la taŭgaj ejoj, por serĉi la perdiĝintajn ŝafojn, kaj por senĉese urĝi kaj admoni!...

En la oficiala granda amfiteatra debatejo ĉeestis 17 delegacioj: Po unu por ĉiu oficiala membro-ŝtato, escepte de Britio (! ?) (anstataŭita de internacia liceo de Bruselo), krome de Pollando (kiu havis polan tradukbudon) kaj de Esperantio (kiu ne havis la saman privilegion)..

Ni plendis pro la fakto, ke nur 35-o el nia 175-membra esperantista grupo rajtis eniri la grandan debatejon. Sed unuflanke, ni konsideru, ke tiu kvanto estis same egala por ĉiu el la 17 delegacioj. Aliflanke, tiel partoprenis la debaton 35 lertaj esperantoparolantoj bone regantaj la lingvon. Kaj krome, tiel ĉeestis en la tribunon proksimume 150 esperantoparolantoj videble montriĝantaj kaj aŭdeble sciigantaj sian esperantecon inter la spektantoj.

Fakte, estas notinde, ke je neniu momento de la laŭdiraj “debatoj” estis efektiva interŝanĝo de demandoj-respondoj. Estis nur sendebataj debatoj kun unudirektaj paroladoj de entute 25 aŭ 30 oratoroj (inter kiuj tri esperantistoj).

PRILA MALESTO DE ESPERANTA TRADUKBUDO.

Same ni grumbliis pro la manko de esperanta samtempa interpretado. Eble (certe?) tiu aranĝo estis intenca por devigi la esperantistojn uzi nur unu el la “oficialaj lingvoj” kaj la “oficialan” traduksistemon. Se estas tiel, ĉiel ni ne falis en la insidilon, kaj ĉiam dum niaj intervenoj laŭte aŭdeble parolis la internacian lingvon....

Kaj finfine ni profitis tiun apartigon, por pli draste nin rimarkigi, elmontrante nian originalecon kaj duope prezentante ĉiujn niajn diraĵojn en laŭte aŭdebla Esperanto kaj en poste tradukita franca versio (samtempe interpretata de la profesiuloj).

Mi neniam antaŭe spertis la sistemon, sed, tiam aŭskultante la francajn tradukoj de la interpretistoj, mi konstatis kiom ties voĉo, tono, hezitoj, proksimumaĵoj, povas perfidi la originalan oratoron. Anstataŭ tiu senkorpa recito, ĉiuj aŭskultantoj devige havis la nuran solvon aŭdi bone elparolitan kaj belsonan esperanto-lingvon antaŭ la dezirita traduko. Mi ne dubas pri iela efiko de tio. Kaj mi observis ĉe miaj najbaroj miran kaj admiran gapon dum la esperanta legado de la esperantista rezolucio per la belega muzika voĉo de nia gratulinda Rumanino.

Fakte estas amuze, ke en la Eŭropa parlamentejo estis oficiale aŭdata Esperanto, dum la franca plenumis la rolon de “pontlingvo”!

PRILA EŬROPLUDO “EUROGAME”.

Skipoj konsistantaj el kvar aŭ kvin malsamlingvaj junuloj devas plenigi demandaron enhavantan demandojn esprimitajn po unu en unu el la oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio. Tiuj demandoj temas pri la historio kaj pri la institucioj de Eŭropo. Unu esperantista skipo - kun eŭropeca mikso (bone emfazita de la komentanto raportanta pri la rezultoj) de Hungaro, Kroato, Litovo, Rumano kaj Francino - sukcesis senerare respondi 12 demandojn el 19, kaj gajnis premieton.

La kvar plej bonaj skipoj (kun pli ol 12 taŭgaj respondoj) partoprenis finan konkurson antaŭ la tuta asembleo kaj ricevis pokalojn. Estonte ni ne devos neglekti tiun eblecon elmontri nian kapablon antaŭ ĉiuj. Kaj tial mi rediras, ke niaj esperantolernantoj devas ankaŭ esti taŭge instruataj pri la evoluo, la institucioj kaj la politiko de Eŭropa Unio...

PRIKELKAJ DIRITAĴOJ FARITAJ DUM LA MATENA KUNSIDO DE LA “JUNULA PARLAMENTO”.

Partoprenis do 17 grupoj laŭ landaj naciaj kriterioj (escepte por la esperantista grupo kaj por la internacia Brusela liceo). Entute proksimume 600 junuloj kiuj plenigis la grandan amfiteatran debatejon. La tribunonj plenigis multe da vizitantoj kaj observantoj, kiujn mi ne kapablis kaj ne provis nombri... La esperantista delegacio dividiĝis inter la amfiteatro (35) kaj la tribunonj (proksimume 150).

Unue okazis elekto de prezidanto, kaj tute normale prezentiĝis 17 kandidatoj al la baloto. Tiu ceremonio precipe ebligis konatiĝi kun la aŭtomata sistemo de voĉdonado... Fakte preskaŭ ĉiuj kandidatoj gurde ripetis (ofte en la angla) samajn frazojn, pri la nepra neceso lerni plurajn lingvojn (2 aŭ 3 minimume), pri la fakto ke lernado de lingvoj estas facila kaj devas esti plifaciligita kaj devas komenciĝi ekde tre juna aĝo, pri la neelturnebla fakto ke la angla estas la supera eŭropa (?) lingvo. Sed tamen mi notis kelkajn interesajn rimarkojn elstarantajn el la kutima ŝablono.

La Germano proponis ununuran oficialan eŭropan lingvon (...la anglan). La Franco emfazis pri la bezono de unu komuna lingvo (Liceo Guillaume Apollinaire de Nice). La Italo insistis pri la neceso de interŝanĝoj per vojaĝoj kaj pere de mona helpo al la studentoj. La Luksemburgiano precizigis, ke ĉiuj liaj samlandanoj perfekte parolas tri lingvojn minimume (kion opinias Claude pri tio?). La Aŭstrino emfazis la efikecon de interreto por interkomunikado kaj proponis kreadon de TTT-ejo “Euroscola”. La portugalo (en la franca) sugestis la adopton de unu “oficiala internacia lingvo”... “kontraŭ hegemonio de Usono kaj de Japanio”...

Certe la esperantista kandidato estis la sola, kiu priskribis la antaŭtimojn de la Eŭropaj junuloj fronte al la pezo de lingvolernado kaj al la problemo de la eniro en la aktivan vivon. Li estis la sola, kiu solvon proponis praktikan kaj tempoŝparan. Li insistis pri la kultura diverseco kaj pri la hegemonia danĝero.

Eble pro tiu sinteno kaj tiu argumentaro, li ricevis 161 favorajn voĉojn kaj atingis la kvaran vicon post Aŭstrio (268), Italio (253) kaj Pollando (239)... Sed fakte mi persone konsideras tute sensignifa kaj folklorita tian voĉdonon, sen antaŭa kampanjo kaj sen iu ajn demando kaj respondo inter la kandidatoj kaj la asembleo....

Ankaŭ okazis voĉdono pri sep demandoj, je kiuj la plejmulto respondis sinsekve, ke: estas dezirinda pli intima unuiĝo de la eŭropaj popoloj; neniu estus ĝenata havi Eŭropanian prezidanton de malsama nacieco ol la sia; estas dezirinda la aliĝo al Eŭropa Unio de centra kaj orienta Eŭropo; estas fruktodona la Eŭropa civitaneco.

Kaj la plejmulto respondis ankaŭ, ke: la Eŭropa parlamento ne havas sufiĉan povon; en la lernejoj estas

donitaj ne sufiĉaj informoj pri Eŭropa Unio.

Kaj la plejmulto respondis ankaŭ: “Ne” al la demando “Ĉu vi deziras nur unu oficialan lingvon, kiu ne estus la via?”. Ĉu tiu nea respondo fontas nur el tio, ke la demando estas malbone starigita, kaj ke ĉiuj komprenis, ke estas subaŭdigita “unu oficialan NACIAN lingvon”?....

Poste du oficialuloj (Unu reprezentanto de la Eŭropa Komisiono - kiu salutis ĉiujn en ĉiu laborlingvo inkluzive de Esperanto - kaj unu reprezentanto de la parlamenta interpretistaro) venis ripeti la samajn sloganojn pri “Unueco”, pri “Diverseco”, pri “Komunikado”, pri “Plurlingveco kaj neceso scipovi minimume tri lingvojn”.

Ambaŭ kviete (aŭ senkonscie?) atendas la baldaŭan oficialigon de 23 lingvoj kaj konsideras la tiel starigitan problemon, certe malfacila, sed evidente solvebla!!...

Ambaŭ insistis pri la fakto, ke “Lerni la anglan estas treege gravega (!)....Sed ne sufiĉas....”

PRILA PROPONOJ FARITAJ DE LA LABORGRUPOJ.

Posttagmeze estis konsistigitaj kvin laborgrupoj pri diversaj lingvaj temoj.

La esperanta grupo estis la lasta, kiu prezentis sian rezolucion. Tio estis majstre farita de la jam citita teamo - Gabrielo prezidanto, Adela raportanto, Xavier komentanto kaj tradukanto - . Nijaj oratoroj estas la solaj, kiuj prezentis siajn argumentojn klare kaj ne balbutante. Kaj la deklamado de Adela estis sentoplena ĉefverko!

La tuta grupo havis teorie salonon kaj tempon por prepari kaj redakti sian rezolucion. Sed estas tre oportune, ke ĝi estis jam verkita de Xavier kaj bone regata de Gabrielo; ĉar dum pli ol duono da la teorie disponebla tempo, unue la respondeca trio serĉis malcertan vojon laŭ insidaj koridoroj, kaj due Xavier forestis por televida intervjuo!!

La antaŭlasta raporto, prezentita antaŭ la nia, ŝajnas al mi tre interesa. Ĝi resume diras, ke: oni nepre konservu kaj ŝirmu sian gepatran lingvon; oni, por esti efika, strebu por regi nur 2 lingvojn, ne pli; oni adoptu unu universalan lingvon... kaj tiu lingvo estu la angla pro ĝia nuna “komerca” disvastiĝo... kaj pro tio ke Esperanto estas lingvo “malnova, senkultura, senhistoria (!)”. (Notu tamen ke Esperanto estas citinda kaj konsiderinda konkurencanto en la areno por la batalo al la solvo de la lingva problemoj).

Mi memorigas, ke estis neniel ebleco starigi demandojn, rimarkojn aŭ kontestojn!

Sekve de tio, kunvenis la raportantoj de ĉiuj laborgrupoj (por Esperanto, Adela kun ŝia pontlingvano Xavier) por pristudi komunan rezolucion. Tiu komuna rezolucio, silentante pri multaj indaj diritaĵoj, kaj voĉdone aprobite de la plejmulto de la ĉeestantaro, simple proklamas, ke: “Ĉiuj Eŭropanoj devas lerni minimume du fremdajn lingvojn”....!...Kiel diris Cyrano de Bergerac: “Tom mallonge, Sinjoro !”...

D-REZOLUCIO DE LA ESPERANTISTA LABORGRUPO.

Jen sekvas la teksto de nia rezolucio.

Mia opinio, ĝi meritas tradukon en ĉiun nacian lingvon de Eŭropo (unuiĝinta ŝtato aŭ kandidatiĝanta ŝtato) kaj sendon al la Eŭropaj parlamentanoj. Mi persone faros tiun tradukon en la francan kaj donos ĝin al Gérard Caudron, okaze de rendevuo, kiun mi havos kun li la 28-an de majo.

Aparte, mi ankaŭ sendos ĉi-tiun raporton al ĉiuj perantoj de la “Pirlot-listo”, kiun mi estas taksita kunordigi, kaj kiuj ekzistas po unu en ĉiu membro-ŝtato de Eŭropa Unio, petante ke ili traduku almenaŭ la tekston de la rezolucio kaj konigu ĝin al siaj Eŭropeparitoj.

(vidu la sekvantan paĝon)

Kaj tiel finiĝas mia raporto.....

En Bersée, je majo 2001

Claude Longue-Epée
<claudel@worldonline.fr>

**TEKSTO DE LA REZOLUCIO PREPARITA DE LA “ESPERANTISTA GRUPO”
KAJ LEGITA EN LA GRANDA DEBATEJO, FARE DE LA RAPORTANTINO
ADELA MICOTA (RUMANIO)**

1- Ni, tuteŭropaj gimnazioj kaj studentoj, lernantaj kaj parolantaj esperanton, dankas al la Eŭropunia parlamento, kiu invitis nin kaj ebligis interesajn interŝanĝojn kun niaj tuteŭropaj samsortanoj.

2- Ni povis tiel taksi interesaj kaj atentindaj iajn diferencojn de niaj diversaj historioj kaj vivmodoj.

Ni volas batali, en perspektivo de pli kaj pli unuiĝonta Eŭropo, por konservi kaj protekti tiun diversecon de niaj kulturoj kaj lingvoj.

Ni petas de la Eŭropuniaj instancoj kaj de la Eŭropaj registaroj, ke ili same faru ĉion eblan por konservi kaj protekti tiun diversecon.

3- Ni konstatis multajn similecojn de niaj problemoj fronte al nia estonteco. Niaj fakaj studoj, pli kaj pli ampleksaj sur terenoj de matematiko, scienco, tekniko, medicino, komerco, k.t.p., malbone kongruas kun la malfacila, temporaba, monoraba, kaj ofte senkuraĝiga, lernado de fremdaj lingvoj.

Aliflanke, malfacila problemo estas por ni la tuja elekto de unu specifa lingvo, kiu faciligu nian estontan profesion vivon sur la Eŭropa kaj monda merkato.

4- Ni konscias, sur tiu tereno, pri la risko, jam estiĝanta, de hegemonio de iu ajn sola “supera” lingvo.

Ni ne volus, ke iu tiel “supera” lingvo donacus al siaj denaskaj parolantoj la netolereblan privilegion eviti temporaban lingvolernadon kaj superi ĉiujn alilingvajn konkurencantojn en la Eŭropaj kaj mondaj ĉiuspecaj aktivecoj.

Ni petas de la Eŭropuniaj instancoj kaj de la Eŭropaj registaroj, ke ili starigu ĉiujn necesajn barilojn kontraŭ tia risko de lingva hegemonio kaj de lingva diskriminacio.

5- Sekve de tio, ni petas:

Ke la Eŭropuniaj instancoj - kaj precipe la Eŭropunia parlamento - studu la eblecon starigi intergrupan specifan komisionon, kun la komisiono ĜStudi la problemon de la Eŭropaj lingvoj kaj alporti solvon por la protektado de ties diverseco kaj kontraŭ risko de hegemonio de iu ajn nacia lingvo».

Ke tiu komisiono laboru sub kontrolo de Eŭropa parlamento, kun la kunlaboro kaj la konsiloj de fakuloj, kleruloj kaj lingvoinstruistoj.

Ke tiu komisiono ekzameni, kune kun esperanto-praktikantoj, la eblecon agnoski kaj oficialigi la internacian lingvon esperanton, kiel naŭtralan helpilon de rekta ĉiucela interkomunikado, kaj kiel propedeŭtikan akcelilon por lernado de fremdaj lingvoj.